横浜 ヨコハマ ようこはま Jokohamo

La 92a Universala Kongreso de Esperanto

Jokohamo, Japanio

2007.08.04 - 11



UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
92a UK
JOKOHAMO
4–11 de aŭgusto
2007

Unua Bulteno

Japanio, la kongreslando:

Tradicio kaj moderneco ekzotikaj

Japanio estas insula lando situanta oriente de Azia Kontinento. La japana insularo konsistas el la kvar ĉefinsuloj, nome Hokajdo, Honŝu, Ŝikoku kaj Kjuuŝuu, kun proksimume 3600 malgrandaj insuloj. Ĝia tuta areo estas ĉ. 377 mil kvadrataj kilometroj, t.e. 25-ono de Usono. Japanio havas ĉ. 120 milionojn da loĝantoj.

La japana insula ĉeno sterniĝas en la formo de arko kiel granda kajo apud Azia Kontinento norde-sude, kaj la norda pinto de Hokajdo kuŝas ĉe latitudo de ĉ. 45 gradoj norde, dum la suda pinto de Kjuuŝuu kuŝas ĉe la latitudo de 30 gradoj norde, kun la Rjuukjuu (Okinava)-insuloj ankoraŭ pli sude.

Sekve Japanio ampleksas diversajn klimatojn ; de la norda regiono havanta malvarmegan klimaton en vintro ĝis la regiono de sud-insulareto havanta subtropikan klimaton.

Ĉirkaŭ 75 % el Japanio enhavas montojn kaj montetojn. 67 % el landa surfaco estas kovrita de arbaro. Japanio havas proksimume 200 vulkanojn, kaj laŭ dokumento ili eruptis 60 fojojn en la pasinteco. La kompleksa topografio estas multe kaŭzita de vulkana aktiveco. La lando plejparte apartenas al la mezvarma klimata zono, kaj havas klarajn diferencojn inter kvar sezonoj. Ĝi estas ĉirkaŭata de maroj kun Pacifika Oceano oriente, Japana Maro okcidente, Oĥotska Maro norde kaj Orient-Ĉina Maro sude. Japanio ŝajnas aparteni al la kultura zono de Orienta Azio, kaj povis kreskigi sian propran civilizacion, ĉar ĝi estis izolita de aliaj landoj. La unika naturo de Japanio verŝajne rilatas al tiu ĉi geografia kondiĉo.

Iomete pri manĝaĵo...

Suŝi-restoracio

Japanoj ĝenerale ŝatas suŝiojn, t.e. vinagritan rizaĵon ofte kun freŝaj fiŝkarnoj. La suŝioj estas servataj en diversaj suŝi-restoracioj, kies preza rango tre varias.

Soba-restoracio

Soba(fagopiro: japanstila nudelo)-restoracio situas tie kaj ĉi tie en Japanio.Tamen soba kaj soba cuju(soba-supo) en ĉiu restoracio gustas diference. Ĉar kuiristo de la restoracio faras siajn specialajn gustojn.

La urbo Jokohamo kaj la tuta japana esperantistaro tutkore invitas vin al la 92a UK en la jaro 2007!

La urbo:

vojkruco de moderneco kaj tradicio

Klimato

La urbo Jokohamo/ Yokohama situas meze de japanaj insuloj fronte al Pacifika Oceano. Klimate Jokohamo situas en la mezo de Japanio, mem en la mezvarma zono. Detale tre agrablaj estas printempo kaj aŭtuno, ne agrablaj estas varmega, humida somero kaj seka, frida vintro. Ĉirkaŭe de marbordo, ĉe kongresejo ventas agrable. Septembre kaj oktobre Japanion ofte atakas tajfunoj. Pluvas multe en junio kaj septembro. Jare tuta kvanto de pluvo estas ĉ. 1400 mm kaj meza temperaturo estas 16,6 celsiaj gradoj. La plej alta kaj malalta temperaturoj estas 31,9 gradoj kaj 1,3 celsiaj gradoj respektive. Vintro estas karakterizita de seka norda vento kaj malmulte da neĝo.

Historio

La urbo longe estadis fiŝista vilaĝo. Sed en 1859 la registaro tiama ferminta la landon kontraŭ okcidentaj landoj, decidis malfermi tiun ĉi lokon al la aliaj landoj, i.a. al Usono, kaj ekkonstruis havenon ĉi tie. De tiam la urbo funkcias kiel la pordo al aliaj landoj, proksime al la japana ĉefurbo Tokio. La foto[1] montras parkon en la haveno, kaj la foto[2]

1

2

montras domon de okcidenta komercisto, nun parto de parko. En la urbo estas fama Ĉina Kvartalo (la foto[3]). Certe, 20km de Jokohamo estas Kamakura, iama ĉefurbo de Japanio antaŭ 8 jarcentoj. La foto[4]montras budhan statuegon tie.

Trafiko

Ĉefaj fervojaj linioj iras en kaj el la stacio Jokohamo divers-direkten. Tie konektiĝas JR-linioj (Japanaj Fervojoj) kun la privataj. Per superekspresa trajno Nozomi Ŝin-Oosaka (Osako) estas atingebla de Tokio en 2 horoj kaj 40 minutoj kaj uzebla ankaŭ de la stacio Ŝin-Jokohama, norde en Jokohamo. Jokohamo estas rekte atingebla per Ekspresa Trajno de Narita Internacia Flughaveno kaj ankaŭ per ordinara linio de Jokosuka (2 horoj). Linio de Minato-Mirai, nova subterlinio, funkcias inter la statioj Jokohamo kaj Motomaĉi-Ĉuukagai. Oni kunligis la linion al Linio de Tookjuu, ĉe la stacio Jokohamo. Najbare de la stacio Motomaĉi-Ĉuukagai troviĝas Ĉina Kvartalo kaj la strato Motomaĉi. Proksime de la stacio "Minato-Mirai" ekzistas la Kvartalo Minatomirai 21(MM21), kie situas la kongresejo.

3

4

La kongresejoj:

Pacifiko-Jokohamo/ Pacifico Yokohama, Halo-Minatomirai

5

6

Jen estas Pacifiko-Jokohamo, nia ĉef-kongresejo(la foto[5]) . Ĝi havas 4 konstruaĵojn reciproke ligitajn(la foto[6]). La konstruaĵo por konferencoj havas 60 kunvenejojn en diversaj grandecoj. La konferencejo estas koridore ligita al kvin-stela hotelo. Por grandaj kongresoj kiel nia Universala Kongreso, Pacifiko-Jokohamo estas ĉiuflanke ideala, inkluzive de ĝiaj spertoplenaj stabanoj. (la fotoj [7,8]: Halo por Solena Inaŭguro vesperaj programeroj, Solena Fermo ktp.)

De la Narita Internacia Flughaveno nur per 90 minutoj da veturo vi atingas la urbon Jokohamo. Tuj antaŭ Pacifiko-Jokohamo malfermiĝis nova subtera stacidomo Minatomirai. Akurata funkcio de trafika sistemo bonorde transportos vin al la celata loko.

Jokohamo estas elstare bona loko por havi internaciajn konferencojn kaj kongresojn: la konvena situo, efika trafik-reto, diversaj instalaĵoj por kunvenoj; ĉio ĉi tio garantias la sukceson de nia Universala Kongreso.

7



8

Kie estas...?

La urbo Jokohamo/ Yokohama situas meze de japanaj insuloj fronte al Pacifika Oceano.

Ĉefaj fervojaj linioj iras en kaj el la stacio Jokohamo divers-direkten.



Kongresaj perantoj

Se estas en via lando, prefere sendu viajn aliĝilon kaj pagon al la peranto. Se ne, sendu la aliĝilon kaj pagon al Roterdamo. Mendojn sen pago oni ne traktos.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg
Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto House, 143 Lawson St, 2016 Redfern NSW
Belgio: Marcel Delforge, Rue des Glacières 16, 6001 Charleroi-Marcinelle aŭ Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
Britio: Esperanto-Asocio de Britio (EAB), Station Rd, Barlaston, ST12 9DE Stoke-on-Trent
Ĉeĥio: KAVA-PECH, Anglickà 878, CZ-252 29 Dobřichovice
Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København
Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, 93812 Kuressaare
Finnlando: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
Francio: Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris
Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
Hispanio: S-ro Pedro A. Garrote Escribano, Apartado 119 Esperanto, 47080 Valladolid. aŭ Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, 08200 Sabadell
Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, 1368 Budapest
Islando: Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, 121 Reykjavík
Israelo: Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin
Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano
Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tokyo
Kanado: Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saarnich, BC V8L 5G5
Korea Resp.: Korea Esperanto-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul, 121-703
Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045
Litovio: Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 3000 Kaunas C
Nederlando: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam
Norvegio: Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen
Nov-Zelando: David Dewar, 4 Harlech Mews Avonhead, 8004 Christchurch
Pollando: Jan Ksiàêek, ul. Paderewskiego 6 m 2, 97-300, Piotrków Tryb aŭ Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345, Bydgoszcz
Rusio: Miĥail Ĉertilov, P.f. 21, 143000 Moskva-Odincovo-6 , Halina Gorecka, ab. ja. 1248, 236039 Kaliningrad aŭ Viktor Kudrjavcev, ab.ja. 132, 620041 Jekaterinburg
Serbio kaj Montenegro: Milica Ristiĉ-Dokmanoviĉ, Bul. Oslobodjenja 29/II, 11000 Beograd
Slovakio: Milan Neubeler, Popradskej brigády 14, 058 01 Poprad
Svedio: Lisbet Andréasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby
Svislando: Franĉois Randin, Pf.246,1000 Lausanne 22
Usono: Esperanto USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530